Registered at G.P.O., Melbourne, for transmission by post as a newspaper.




(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:
BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).
Abono (por 10 numeroj):
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj——————Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.
Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.
Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.
Unu numero: 6 pencoj. :: :: :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.
Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 154 (14th Year). MELBOURNE (AŬSTRALIO). 23 AŬGUSTO, 1933.

## THE EDUCATIONAL VALUE OF ESPERANTO.

In view of the great need, under modern conditions, for a simple yet adequate international auxiliary language, which could be learned in all civilised lands, and freely employed in speech and writing in all walks of life, we desire to call attention to the merits of Esperanto, and its place in education.

This language has now stood the test of forty-five years' practical use. Its success has been demonstrated at no less than twenty-four International Congresses, commonly attended by upwards of 1,000 persons, representing thirty to forty nationalities. No interpreters are needed at these gatherings, or at the sectional meetings of specialists which are held in conjunction with them or at other times.

Not only is there a wide-spread and fluent use of the language for travel, cultural intercourse, and personal friendship, but its achievements for technical and professional purposes are already considerable. Esperanto lectureships have been established at the Universities of Liverpool, Geneva and Cracow; original works in the language have been published inter alia by Prof. Baudouin on Auto-suggestion, by Prof. Bovet on Psycho-analysis, and by Prof. Collinson on Language. Much scientific and technical matter has appeared, particularly in Japan, where it has included papers and treatises on such diverse subjects as the strength of materials, inorganic and organic chemistry, and meteorology; in the same country a pharmaceutical vocabulary has been issued in Esperanto, and several technical dictionaries in the language have been published in Europe, including one of nearly 4,000 terms issued by the international society of Esperantist doctors. During 1931 alone, 1,204 Esperanto talks and 514 lessons were broadcast from wireless stations in 21 countries, including Japan.

The international society of Esperantist teachers has on its files the names of nearly 7,000 teachers (in sixty countries) who know the language, and over 1,000 schools (in thirty-two countries) where Esperanto classes have been set up. These include elementary and secondary schools in Great Britain, and it is of interest to mention that the Board of Education for England and Wales has for many years permitted school and evening classes in Esperanto when a request has been made for their establishment.

We advocate the adoption of Esperanto as the first language to be studied, after the mother tongue, in the schools of all countries, both on general grounds and for the following specific reasons:—

(1) A working knowledge of Esperanto can be obtained in a remarkably short time compared with that required for national languages, which abound in difficulties of grammer, idiom, and pronunciation; thus the study of it is profitable even for pupils who have not the time or ability to learn an ordinary foreign language well enough to be able to use it.

(2) It tests linguistic ability, and assists the teacher more rapidly to select the pupils who can profitably take up the study of other tongues, to which it is an excellent introduction.

(3) Its logical grammar, and the fact that its method of expression is lucid and unambiguous, tend to develop accuracy in the use of words.

(4) A knowledge of Esperanto not only acts as a stimulus to the learning of other languages, but also leads to a more effective study of geography, including an interest, gained through correspondence, in the life of other countries in all parts of the civilised world.

(5) Esperanto literature, both original and translated, is constantly increasing, and is already sufficient to justify a study of the language for its own sake.

We heartily associate ourselves with the efforts that are being made to introduce Esperanto as a regular subject of instruction, and to encourage its use in the schools of the world.

T. GRAHAME BAILEY, M.A., B.D., D.Litt., Reader in Urdu and Hindustani, University of London.

T. C. BAILLIE, M.A., D.Sc., Principal West Ham Municipal College.

W. E. COLLINSON, M.A., Ph.D., Professor of German, and Buchanan Lecturer in Esperanto, University of Liverpool.

CHAS. W. COWEN, M.A., President, National Union of Teachers, 1929.

C. B. FAWCETT, B.Litt., D.Sc., Professor of Economic and Regional Geography, University of London.

J. J. FINDLAY, M.A., Ph.D., M.Ed., Honorary Professor of Education, University of Manchester.

ALEXANDRA FISHER, M.A., D.Litt., Headmistress, Girls' County School, Bishop Auckland.
J. C. FLUGEL, B.A., D.Sc., Assistant Professor in the Dept. of Psychology, University College, London.
S. MARGERY FRY, M.A., L.L.D., Late Principal of Somerville College, Oxford.
G. P. GOOCH, M.A., D.Litt., Fellow of the British Academy.
G. H. GREEN, M.A., Ph.D., Lecturer in Education, University College of Wales, Aberystwyth.
T. GWYNN JONES, M.A., Professor of Welsh Literature, University College of Wales, Aberystwyth.
N. P. JOPSON, M.A., Reader in Comparative Slavonic Philology, King's College, London.
C. W. KIMMINS, M.A., D.Sc., Late Chief Inspector, Education Dept., L.C.C. (1904-23).
JOHN A. PEART, M.A., Director of Education, City of Winchester.
EMILY PHIPPS, B.A., Barrister-at-Law, Late Headmistress, Municipal Secondary Girls' School, Swansea. Late Ed. of "The Woman Teacher."
W. RAMSDEN, D.M., Fellow of Pembroke College, Oxford; Emeritus Professor of Bio-Chemistry, University of Liverpool.
NOWELL SMITH, M.A., Formerly Headmaster of Sherborne.
G. A. SUTHERLAND, M.A., Principal of Dalton Hall, University of Manchester.
J. R. R. TOLKIEN, M.A., Rawlinson and Bosworth Professor of Anglo-Saxon, University of Oxford.

(Reprinted from "The British Esperantist.")

## BAPTADO DE LA PINGVENOJ.

(Noto: "L'Ile des Pingouins,," verko de Anatole France, koncernas ĉefe la sanktulon Mael, kiu ricevas signon de la ĉielo, ke li devos fari evangelian vojaĝon. En mirakla ŝtona barko foririnte, li sukcesas konverti sesdek insulojn kaj tiam revenas al sia abateco ĉe Yvern. Poste, konsterne aŭdinte, ke liaj konvertitoj refalas en paganismon, li denove ekiras al la insuloj, dum kiu vojaĝado li trafas sur la scenon de la jena priskribo, la Insulon de la Pingvenoj.)

La sankta homo jam preskaŭ rondiris la insulon, ne renkontante ium loĝanton, kiam li atingis vastan cirkon formitan el rokoj brunflavaj kaj ruĝaj, plenan de belsonaj akvofaletoj, kaj kies supraĵo bluiĝis en la nubojn.

La rebrilado de la polusa glacitavolego brulis la okulojn de la maljunulo. Tamen lumeto ankoraŭ malforte penetris liajn ŝvelintajn palpebrojn. Li videtis animhavajn figurojn, kiuj sin prezentis en etaĝoj sur la rokoj, kiel homamaso sur la deklivoj de amfiteatro. Kaj sammomente, al liaj oreloj, surdigitaj de la daŭra muĝado de la maro, alvenis nebrua sono de voĉoj. Pensante, ke ĉi tio estas ja homoj vivantaj sub natura leĝo, kaj ke la Sinjoro vojaĝigis lin por ke li instruu al ili la leĝon dian, li ilin ekevangeliis.

Sin muntinte sur altega ŝtono en mezo de la sovaĝa cirko: "Loĝantoj de ĉi tiu insulo," al ili li diris, "kvankam vi havas etan staturon, vi aspektas malpli kiel trupo de fiŝistoj kaj maristoj ol kiel la senato de saĝa respubliko. Per via seriozeco, via silento, via trankvila sinteno, vi faras sur ĉi tiuj sovaĝaj rokoj kunvenon komparindan kun la Konskriptaj (1) Patroj de Romo konsiliĝantaj en la Templo de Venko, aŭ plue, kun la filozofoj de Ateno disputantaj sur la benkoj de la Areopago (2). Sendube vi posedas nek ilian sciencon, nek ilian genion, sed povas esti, ke, en rigardo de Dio vi pli gravas ol ili. Mi opinias, ke vi estas simplaj kaj bonaj. Promenante sur la bordo de via insulo, mi vidis nenian idolon de murdo, nenian postesignon de mortigado, nek kapojn nek kaphaŭtojn de malamikoj pendigitajn sur stangoj aŭ najlitajn sur la pordoj de viaj vilaĝoj. Ŝajnas al mi, ke vi ne havas artaĵojn, kaj ke vi ne scias labori pri metaloj. Sed viaj koroj estas puraj kaj viaj manoj senkulpaj. Kaj la vero facile eniros en viajn animojn."

Nu, kion li vidis kiel homojn kun etaj staturoj sed kun seriozaj mienoj, tio estis gepingvenoj reunuigitaj de la printempo, kaj kiuj aranĝis sin en paroj sur la naturaj ŝtupoj de la rokaro, ĉiuj rektaj kun la majesto de iliaj grandaj blankaj ventroj. De momento al momento ili movis, kiel brakojn, siajn flugiletojn kaj faris pacajn kriojn. Ili ne timis la homojn, ĉar ili ne konis ilin kaj neniam ricevis malbonon de ili, kaj estis en ĉi tiu religiulo iu dolĉeco, kiu rekuraĝigis la plej timemajn animalojn, kaj kiu ege plaĉis al ĉi tiuj pingvenoj. Ili sin turnis al li kun amika scivolemo,, kun iliaj etaj rondaj okuloj plilongigitaj antaŭe per blanka ovala punkto, kiu donis al ilia aspekto ion bizaran (F. bizarre: strangeta, eksterkutima) kaj homan.

Kortuŝite de ilia akcepto, la sanktulo instruis al ili la Evangelion.

"Loĝantoj de ĉi tiu insulo, la tera tago, kiu jus leviĝis super viaj rokoj, estas bildo de la ĉiela tago, kiu leviĝas en viaj animoj. Ĉar al vi mi portas la internan lumon; al vi mi portas la lumon kaj la varmon de la animo. Kiel la suno degelas la glacion de viaj montoj, tiel Jesuo Kristo degelos la glacion de viaj koroj."

Tiel la maljunulo parolis. Kiel ĉie tra la Naturo voĉo alvokas voĉon, kiel ĉio, kio spiras en la taglumo, ŝatas alternativajn kordojn, tiel ĉi tiuj pingvenoj respondis al la maljunulo per la sonoj de siaj gorĝoj. Kaj iliaj voĉoj estis molaj, ĉar la pingvenoj estis en la sezono de la amo.

Kaj la sankta homo, konvinkita en si, ke ili apartenas al idolama popolo, kaj ke en sia propra lingvo ili faras aliĝon al la Kristana kredo, ilin invitis ricevi la bapton.

"Mi opinias," li diris al ili, "ke vi ofte banas, ĉar la kuvetoj en la rokoj estas plenaj de pura akvo, kaj mi vidis, dum mi venadis al via kunveno, ke kelkaj el vi ensaltis en ĉi tiujn naturajn banojn. Nu, pureco de la korpo estas bildo de spirita pureco."

Kaj li instruis al ili la devenon, la naturon kaj la efikon de la bapto.

"La bapto," li diris al ili, "estas Adopto, Renaskiĝo, Renovigado kaj Lumigado."

Kaj al ili li sinsekve klarigis ĉiun el ĉi tiuj punktoj.

Plue, beninte la akvon, kiu falis de la akvofaletoj, kaj redirinte la ekzorcizojn, li baptis tiujn, kiujn li ĵus instruis, verŝante sur ĉiun kapon unu guton de pura akvo kaj eldirante la sanktan parolon.

Kaj li tiel baptadis la birdojn dum tri tagoj kaj tri noktoj.

### Kunveno en Paradizo.

Kiam en la Paradizo oni konis pri la baptado de la pingvenoj, okazis nek ĝojo nek malĝojo, sed iu granda surprizo. La Sinjoro mem embarasiĝis. Li alvokis kunvenon de klerikuloj kaj doktoroj kaj demandis ilian opinion, ĉu la baptado havas validecon.

"Estas nule," diris Sanktulo Patriko.

"Kial estas nule?" demandis Sanktulo Gal, kiu evangelie konvertis la popolon de Kornvelo (A. Cornwall) kaj instruis al la sankta homo Mael liajn apostolajn laborojn.

(Granda disputo sekvas inter la sanktuloj. Kelkfoje la Sinjoro devas pacigi la kunvenon, kaj fine Li akcep-

tas la konsilon de kvietanima Hermas, kies patrino estis Safiro. Noto de la trad.)

Kiam ordo estis restarigita, maljunulo Hermas sin levis kaj malrapide parolis ĉi tiujn vortojn:

"Mi vin laŭdas, Sinjoro, ĉar Vi igis, ke mia patrino Safiro naskiĝu inter Via popolo en tiu tempo, kiam la roso de la ĉielo refreŝigis la teron naskdolorantan pro ĝia Savonto. Kaj mi al Vi laŭdas, Sinjoro, ĉar Vi donis al mi, ke mi vidu per miaj mortemaj okuloj la Apostolojn de Via Dia Filo. Kaj mi parolos en ĉi tiu solena kunveno, ĉar estas Via volo, ke la vero eliru el la buŝoj de la humilaj, kaj mi diras: 'Ŝanĝu ĉi tiujn pingvenojn en homojn. Estas la sola decido konvena al Via justeco kaj al Via pardonemo' ".

Kelkaj doktoroj petis permeson paroli, aliaj ekparolis. Neniu aŭskultis, kaj la tuta konfesoraro tumulte ŝancelis siajn palmobranĉojn kaj siajn kronojn. La Sinjoro, per unu gesto de la dekstra mano, pacigis la kverelojn de siaj elektitoj.

"Ne plu konsiliĝu," li diris, "La opinio esprimita de milda, maljuna Hermas estas sola konvena je miaj e t e r n a j p l a n o j. Ĉi tiuj birdoj estu ŝanĝotaj en homojn. Mi antaŭvidas per tio kelkajn malfacilaĵojn. Multaj inter ĉi tiuj homoj faros pekojn, kiujn ili ne farus kiel pingvenoj. Certe, ilia sorto, per ĉi tiu ŝanĝo, estos malpli bona ol se ili estus sen ĉi tiuj bapto kaj enkorpigo en la familion de Abraham. Sed estas konvene, ke mia antaŭscio ne forprenu iel de ilia libervolo. Por ke mi ne malhelpu homan liberecon, mi ignoros, kion mi scias; mi remetos sur la okulojn la nebulon, kiun mi travidis, kaj en mia blinda klarvidipovo mi lasos, ke mi supriziĝu je tio, kion mi prae vidis."

Kaj tuj alvokante la ĉefangelon Rafaelo:

"Vi trovu," li al li diris," la sanktan homon Mael; informu lin pri lia eraro kaj ordonu al li, ke, armite per mia Nomo, li ŝanĝu ĉi tiujn pingvenojn en homojn."

(1) **K o n s k r i p t a j:** L. conscriptus, participo de conscribere, enregistri. La K o n s k r i p t a j Patroj; tiel nomitaj ĉar iliaj nomoj estis enregistritaj sur la skribrulaĵo de la senato.

(2) **Areopago,** kaj postaj linioj. Vidu la Novan Testamenton ĉe Agoj 17/19-31.

---

## POST BAG.

A.E.A. in C.—According to the Universala Vortaro -ant signifies "the ending of the present participle active in verbs," that is, one performing the action denoted by the root; -ul signifies "person noted for" (or better, person characterised by). In other words, -ant stresses the doing of the action; -ul stresses the characteristic, inherent or incidental, of the individual. The difference, in our particular case at least, is a fine one, and "komenculoj" is as good as "komencantoj" for the purpose of our heading.

Bo. in T.—"Parker" is a root of the U.V. and signifies that which the English mean by "by heart." "Perkore" would not have that signification, because one does not learn by the heart, but by the memorising faculty of the brain. Very likely Zamenhof was influenced by the French "par coeur." Although the adverbial form is most used, one finds also "parkero," "parkeri," "parkera." Notice also that he gave us, too, the form "volont" as a root with a special meaning, not the same as the participle of "voli."

Abituriento.—Kompreneble ni devas eviti doni impreson, ke la tipa Espisto estas filistro, malŝatanta entute la klasikajn lingvojn. Niaj kritikaj atakoj estas tute nur kontraŭ la troa pretendemo de tiuj, kiuj laŭ nia sincera opinio faras asertojn favore al tiuj lingvoj absolute senbazajn. La studado de mortintaj idiomoj, ekster ĉia diskuto, ankoraŭ havas sian valoron.

S-ino C.T. en N.Z.—La radiko "koneks' " troviĝas en la plimulto de modernaj vortaroj. La Plena Vortaro difinas: Koneksa:—Interligita; proksime interrilata kun analoga afero.

## ZAMENHOF- KAJ ESPERANTO-STRATOJ.

Laŭ novaj informoj ni povas la donitan nomaron kompletigi. Pri iuj urboj nun nomataj ni ne havas fidindajn sciigojn, ĉu la menciata nomo estis efektive donita kaj ĉu la okazinta decido ne estis ŝanĝita. Tiel okazis ekzemple en Brno, kiu do ne havas—kontraŭe al gazetaj sciigoj—straton de Zamenhof.

Ni estos tre dankaj por ĉiu sciigo koncernanta ĉi tiun aferon.

Liepaja (Latvio)—Esperanto iela.
Bergen - op - Zoom (Nederlando)—Plaats van dr. Zamenhof.
Bor-Haida (Ĉehoslovakio)—Zamenhofgasse.
Dusseldorf (Germanio)—Samenhofweg.
Vich (Hispanio)—Carrer Dr. Zamenhof.
Mulhouse (Francio) — Rue Dr. Zamenhof.
Neuenahr (Germanio) — Zamenhofstrasse. ("La Progreso," Praha.)

## PROFESSOR LODEWYCKX AND ARTIFICIAL LANGUAGES.

Everyone interested in the problem of International Language welcomed the series of talks given by Professor Lodewyckx over 3AR recently. We feel, however, impelled to comment on two of the points touched on by the lecturer, viz., the strength of the organised Esperanto movement, and the fitness of Esperanto as a literary medium.

The professor said: "Statistics published five years ago showed some 50,000 Esperantists organised in groups or associations throughout the world; probably the actual number of people practising the language amounted to between 500,000 and a million." This is only partly correct. The statistics referred to were compiled by Dr. Dietterle, president of the German Esperanto Federation, in 1928. His honest and conservative estimate, most carefully arrived at, gave "126,508 Esperantists of whom we have trustworthy knowledge. They are found in more than 100 countries, in more than 7,000 places of the world. Of these 41,751 are organised in 1,776 groups . . . . The figures are, however, incomplete, and therefore too low." Authorities at the time calculated that it would approximate to the truth to say that the 126,508 represented around ten per cent. of those using Esperanto throughout the world. (Vide "Esperanto," Geneva, July, 1928.)

It may be added that in 1922, owing to political causes, the Soviet Esperantists severed connection with the central body in Geneva, the Universal Esperanto Association. This fact made it extremely difficult to rightly appraise the strength of the movement in Russia, where Esperantists may be found in the most remote places of that vast dominion. Only in recent years has a definite organised plan been formulated to gather these individual adepts into the Soviet Esperantist Union.

Then said the professor: "Basic English is not really suitable for literary use. The older auxiliary languages, Esperanto, Ido, etc., being even more artificial in structure and further away from natural living languages, are even less suitable to be adapted to literary use, at least in their present forms. How such a language might develop, once generally accepted and widely used, it is hard to say. Perhaps it is

not unthinkable that a real literary language might evolve from it later."

Well, as to Basic English, we will not differ. We venture, however, to set down a few expressions of opinion recently given by well-known European writers, which make it clear at least that there is room for difference in assessing the literary standing of Esperanto.

Stepan Zweig, author of "Sergeant Grischa," writing to those responsible for the Esperanto version of his "Eyes of the Eternal Brother," said: "How thankful I am to you that I now possess my book in that language which links together all European languages, and does more for the intercomprehension of the peoples than all the congresses and gaudy demonstrations" (Vide "Heroldo de Esperanto," Koln, 27/2/32).

Prof. Ossendowski, world - famed author of "Beasts, Men and Gods," has said: "Esperanto can play an important part in diffusing among the people the fruits of a common artistic and literary life. Translation could be made for example from Polish into Esperanto and so spread throughout the world without the necessity for putting it into the many national tongues, which latter process is hurtful to the character and psyche of the works so treated."

Lüdwig Renn, author of "War," has used Esperanto as a medium for his artistry in words, both in poetry and prose.

Prof. Charles Baudouin, litterateur and psychologist, is also an Esperantist. He said: "I find that I can write my poems in Esperanto as easily as I can in my mother-tongue, French." He has written in original Esperanto "La Arto de Memdisciplino" (The Art of Self-discipline).

Mihaly Babits, possibly Hungary's greatest living literary son, has seen with gratification some of his writings in Esperanto. Frederik Karinthy, another leading Hungarian writer, is an Esperantist, and gladly sees his work appear in that language.

Selma Lagerlof, Nobel Prize winner, Swedish woman of letters, in an interviwe ("Literatura Mondo," April, 1933) spoke glowingly of Esperanto as a literary medium, and gave full consent for the publication in the language of all her books. The second, "Mr. Arne's Money," has just been announced in the Esperanto press of 60 countries.

We could go on citing the favorable opinions of present-day litterateurs relative to Esperanto, but we hope our end has been attained. And we will not do more than mention the field of translation from the classics of the world, believing that most people know of the Esperanto Bible, the Esperanto versions of Shakspere's Tragedies, and the rest. Suffice it to say that the great labor of Dante is being now rendered into the international language by the Hungarian polyglot Kalocsay.

Says W. Matthews in "International Language" (Dec., 1930): "Esperanto has the colorful vowels of Italian and Spanish; and is richer in consonant sounds than Italian. In speech it sounds very much like Italian; Compton Mackenzie has confessed as much . . . I should like to quote the famous sonnet of Dante, La Donna Mia:—

Tanto gentile e tanto onesta pare
la donna mia, quand'ella altrui saluta,
ch'ogni lingua divien tremante muta
e gli occhi non ardiscon di guardare.

Ella sen va, sentendosi laudare,
benignamente d'umilta vestuta;
e par che sia una cosa venuta
di cielo in terra a miracol mostrare.

Mostrasi si piacente a chi la mira
che da per gli occhi una dolcezza al core
che intender non la sa chi non la prova.

E par che dalla sua faccia si mova
uno spirito soave e pien d'amore,
che va dicendo all'anima: sospira!

Here is the Esperanto translation, which conserves, I think, more of the beauty of the original than could English:—

Aperas jen, modeste kaj ĝentile,
estrino mia kun la gest' saluta;
tremante, ĉiu lango iĝas muta,
en bril' okuloj klinas sin humile.

Sentante laŭdojn, iras ŝi trankvile,
de l'honesteco envestite tuta,
sur teron kvazaŭ ĉielalto kruta
fluigis mirindaĵon perflugile.

Kaj ŝi afable donas por admiroj
dolĉecon tian per okul' al koro,
ke tiu nur ĝin konas, kiu provas.

De ŝiaj lipoj sin karese movas
spireto ama, plena de favoro,
ke diras al anim': al mi, sopiroj!"

We could quote equally fine lines from certain of the best done in original Esperanto.

Having shown something of the beauty of spoken Esperanto, we must close with an example of the fidelity with which Esperanto can render prose text. The following is taken at hazard from "The Robbers," Schiller:—

Er wird jede Minute die Ihr ihnen getodtet, jede Freude die Ihr ihnen vergiftet, jede Volkommenheit die Ihr ihnen versperret habt, von Euch fordern dereinst.

French translation of Regnier, of the French Institute: Il vous demandera compte un jour de chacune des minutes que vous leur avez enlevèes, de chacune des joies que vous leur avez empoisonnèes, de chaque perfection où vous les avez empechè d'atteindre.

Esperanto translation of Dr. Zamenhof:—Ĉiun minuton, kiun vi al ili mortigis, ĉiun ĝojn, kiun vi al ili venenis, ĉiun perfektecon, kiun vi al ili baris, li iam ekpostulos de vi.

## FOR YOUR BOOKSHELF.

**"Idoj de Orfeo,"** Bulthuis, 4/6.
**"Tri Angloj Alilande,"** Merchant, 1/6.
Postage extra, and obtainable from:
**Melbourne Esperanto Society,**
**Box 731F, G.P.O., Melbourne.**

## RADIO COLUMN.

Speakers are requested to send in by 20th September at latest, particulars of any broadcasts arranged.

Esperanto lessons will be broadcast from **3AR (Melbourne)** at 7.45 p.m. on Saturdays Sept. 2nd, 16th, 30th.

The lecturer will be pleased to answer questions relating to grammar and pronunciation. Address all inquiries to "Esperanto," care of 3AR.

The Pyke Memorial Examination in Esperanto will be held early in November. It is open to all students of the international language residing in Australia. A certificate of competency is awarded to successful students and, in addition, those who commenced the study of Esperanto on or after Nov. 1st, 1932, are eligible to compete for a special prize of £5/5/-. Examining committees have been appointed in Brisbane, Sydney and Melbourne. Intending competitors are invited to send a stamped and addressed envelope for a test paper to R. R. Rawson, Hon. Secretary, Pyke Memorial Examination, 169 Exhibition St., Melbourne.

**Press errors:**—p. 67, col. 1, last line but one. "inda la plumo" (read: inda la plumon); col. 3, line 10, "ateŝeo" (ataŝeo); p. 71, col. 3, line 47 "Set" (Sed).

Pro teĥnika kaŭzo la litero "ŝ" nur malfacile povas aperi pli ol unu fojo en la sama linio.

En la peco pri "Hamleto" en la junia n-ro bedaŭre reproduktiĝis preseraro ("tempo" anstataŭ "templo). La tuta demando pri la armeoj da presfuŝaĵoj en la tradukitaj verkoj de Zamenhof postulas apartan artikolon, kiu sufiĉe nudavorte draŝu tiujn respondecajn pri la aĉaj eldonserioj.

### ESPERANTO ON THE MARCH.

Bishop Eltschkner of Praha, Czechoslovakia, is the "first Esperantist bishop" in the world. He speaks the language fluently. He has delivered sermons in Esperanto in the Church of St. Ursula, in the Czech capital.

Prof. Piccard, the stratospherist, has declared himself favorable to Esperanto, which he asserts would be of the greatest use to science.

The Manchurian Esperanto-federation is striving to establish Esperanto as the official language for international communication in the new state of Manchukuo.

In Sweden during 1932, 10,530 textbooks, 4,000 sets of correspondence courses, 3,000 dictionaries, and 17,000 "keys."

In England Esperanto is being taught in 27 schools to some 1,000 pupils. ("British Esperantist.")

In France it is being taught in 45 schools. The patronal committee of the French Society for the Propagation of Esperanto contains more than a hundred Parliamentarians of every political color. ("La Movado.")

### LATINISTOJ KAJ ANGLA PROZO

Estas absolute vera diro tio, ke treege malfacile estas uzi la anglan lingvon korekte kaj koncize; sed ke neniu povas tiel uzi ĝin sen antaŭa fundlerno de l'latina estas diro nur tre partece vera.

Bunyan, kiu tute malsciis la latinan, verkis pli klasikan anglaĵon ol tiu de Bentley, unu el la plej erudiciaj latinistoj. Dickens, kiu ne estis latina instruitulo, estis pli korekta kaj belesprima verkisto ol Thackeray, kiu bone sciis la antikvan idiomon. Jane Austen, kiu ankaŭ fremdis je la latina, verkis pli ekzakte kaj koncize ol Scott, kiu en alta grado posedis la lingvon de Cicerono. Mark Twain, malforta rilate la latinan, naskis multe pli trafespriman prozon ol la antikvalingva lertulo Swinburne. G. B. Shaw, ne tirinte sian stilarton el mortintlingvaj fontoj, tamen donis kaj donas al ni verkojn pli riĉajn je akra, penetra frazologio ol tiuj de Max Beerbohm, kiu eduke ricevis la scipovon tiel imiti.

Finfine, multe da homoj, malgraŭ tio, ke ilia klasika lingvoscio estas vasta, verkis lingvaĵon, pri kiu oni povas aserti, ke centoj da simplaj homoj, kies modestaj nomoj estas nur malfacile troveblaj en la liferatura historio, povas ĝin superi laŭ stilo kaj laŭ gramatika korekteco.

(Reverkita laŭ paragrafo en "English for the English," de G. Sampson.)

## SERIOZE KAJ SERCE

Mi pensas, ke estas nenio en la mondo komparinda kun la avideco per kiu virinoj povas forgesi tion, kio foje estis ĉio al ili. Per tiu ĉi mirinda povo de forgesado, ne malpli ol per sia kapablo de amo, virinoj estas unu el la veraj fortoj de la naturo.

—Anatole France en "La Povo de la Antaŭjuĝo."

---

"Nenia lingvo povas egali la lingvon zuluan pri kunmetitaj vortoj," skribas korespondantino en la "Virina Spegulo." "La nomo de mia edzo en Zululando estis Umkuzubela, kaj tiuj dek literoj signifas: La etulo kun la nigra kapo kiu ĉirkaŭkuras tre rapide kaj faras multan laboron." Ni havas multajn kunmetitajn vortojn en Esperanto, sed mi dubas ĉu ni povas egali ĉi tiun.

---

Flegistino—Tiu filmaktoro kiun oni portis en la hospitalon antaŭ unu horo estas tre bela.

Doktoro—Jes, sed ne mezuru lian temperaturon. Li plendis pro la fakto ke kvin flegistinoj jam faris tion.

---

Viro povas konstrui por si tronon el bajonetoj, sed li ne povas sidi sur ĝi.

—Dean Inge.

---

Du irlandaj kamparuloj kaŭris post kreskaĵbarilo kun bastonegoj, por mortigi sian avaran luiganton, kiu estis venonta por kolekti la lupagon. Kiam post multaj minutoj li ne venis, unu diris al la alia—"Mi esperas ke neniu malbonaĵo okazis al la kompatinda maljunulo!"

---

Estas pli bone ne scii tiom multe, ol scii tiom kio efektive ne estas.

—Josh Billings.

---

Sed kio estas la libereco, sen saĝeco kaj sen virto? Ĝi estas la plej granda el ĉiuj eblaj malbonaĵoj; ĉar ĝi estas malsaĝeco, malvirto kaj frenezeco, sen kulturado kaj sen disciplino.—Burke.

---

"Kie vi studadis la pentroarton?" juna studento foje demandis al Whistler.

Tuj tiu respondis, "Kie ajn mi estis."

---

Loĝanto (plendante)—Tiu-ĉi estas abomena! Mi estas restinta en tiu ĉi loĝejo dum pli ol unu semajno, kaj mi ne havis purajn viŝilojn, kaj neniam mi povas trovi la sapon por la lavado.

Dommastrino—Nu—vi havas langon en la kapo, ĉu ne?

Loĝanto—Jes—sed mi ne estas kato!

---

"Donu al mi kison," petegis la junulo, kiu sidadis kun la bela junulino, post valso.

Ŝi ne respondis.

"Mi petegas—Ĉu vi ne donos al mi kison?" li ree demandis, pli laŭte.

Ŝi tute ne respondis.

"Ĉu vi estas surda?" li fine kreigis.

"Ne," ŝi respondis akre, "Ĉu vi estas paralizita?"

---

Turisto (en kampara vilaĝo)—Kio estas la ĉefaj vidindaĵoj ĉi-tie?

Vilaĝano—Por la personoj el la urbo—niaj montoj. Por la vilaĝanoj—la personoj el la urbo.

---

Ŝi—Ĉu vi okupis tian longan tempon por gajni la patran konsenton?

Li—Ho, ne! Li ne povis trovi la korktirilon.

---

Ŝi (plorante)—Vi rompis la promeson kiun vi donis al mi.

Li—Ne ploru, karulino; mi donos al vi alian.

---

Kiel malsimilas hundo, kiu postsekvas postesignojn, al homo gajninta la diplomon de la B.E.A.?

La unua marŝas naz-al-tere.

La dua marŝas naz-alt-aere.

### PLI PRI JAN WELZL.

**(Vidu La S.K. Nov. 1931)**

Lau "The Quest for Polar Treasure" (La Serĉo al Polusa Trezoro) la dua verko de la aventurema ĉeho Jan Welzl, leonino—negrava objekto—ne povas timigi alaskanon aŭ Aleŭtian indianon. Ni devas supozi, ke tiuj harditaj de l'naturo homoj eĉ partoprenas kun la ursoj ĉi ties preferatan ludon, nome la ĉirkaŭpremegadon. "Unu el la homoj," diras Welzl, "surmetas maskon el urspelto, gantojn el la sama; kaj ĉirkaŭ la bruston li firme nodas ledaĵon provizitan per du longaj akraj tranĉiloj rigide elstarantaj. Li tenas krome tranĉilon en ĉiu mano . . . la furioza besto, en ĝia karakteriza korpteniĝo, starante sur la postaj piedoj, ĉirkaŭprenas la ĉasiston. Je tio la du tranĉiloj enpenetras la ursan bruston kaj sammomente la kuraĝa homo enpikegas la du mane tenitajn armilojn en la ventron de sia antagonisto . . . Mi ofte vidis tiajn batalojn kaj rigidiĝis de timo, kiam la indiano kvazaŭ formal-

aperis en la tenegon de la besto."

Sed plue, laŭ Welzl, oni rigardas la ursojn de la glacia nordo kiel tute netimindajn. Oni jungas ilin al sledoj kaj eĉ en unu kazo servigis ilin kiel sendknabojn kaj ĝajigantojn en drinkejo. La rakontoj de Welzl pri frutempa Alasko sufiĉe tre sensacias sed lia maniero fari ilin estas ja naiva. Ekzemple: "Junaj sinjorinoj venis tien el preskaŭ la tuta mondo. Ili gajnis la vivrimedojn per dancado; kaj kiam ili renkontiĝis kun orfosisto ili penis lin logtiri en sian reton . . . Mi dubas, ĉu iu el tiuj inoj venis al bona vivfino. Kompreneble ilia sorto multe dependis de la karaktero de la fosistoj kun kiuj ili konatiĝis. Kelkaj el tiuj ĉi estis tre krudmoraj uloj. Foje ili ekprenis per la kruroj unu tian sinjorinon kaj ĵetis ŝin en riveron kaj lasis al si naĝi."

(El "John o'London's Weekly.")

## KELKAJ DEMANDOJ PRI VIROJ

Antaŭ nelonge mi legis en libro de George Moore (Saluton kaj Adiaŭon) la sekvantan perlon de saĝeco: "La takto de virinoj ne povas esti tro laŭdita: ili devas ekzerci ĉiom da sia takto por kunvivi kun ni: kaj ili faras ĉi tion tre bone, ŝajnigante intereson en niaj ideoj, trompante nin—sed kiel ĉarme—akceptante la religiojn kiujn ni verkas, kaj la moralojn pri kiuj ni ŝatas nin ĝeni, kvankam ili komprenas nek moralojn nek religiojn, nur amantojn, infanojn, kaj florojn. Mirinda raso estas la raso de la virinoj, tute ne komprenata de la viroj."

Mi formetis la libron, kaj mi miris ne pri la miriga raso de virinoj, sed de viroj. Ĉu estas eble ke ili vere kredas ĉion kion ili diras pri virinoj? Ĉu la amaso de sensencaĵoj kaj mensogoj kiujn ili elŝutas estas pripensita? aŭ ĉu ili ĝin faris sole per refleksa agado? Kiom da fojoj mi legis ĉi tion aŭ tion pri virinoj: ili havas korojn, sed ne cerbojn; sentojn, sed ne racion; intuicion, sed ne inteligenton; ili povas vivi sen mono, sano, belo, sed ne sen viro; ili povas forgesi Dion, virton, ĉastecon, sed ne la unuan kison; ili preferas hejmkamenon al famo, trono, aŭ mondpovo,—ktp. ktp. Kaj nun por nia sciigo alvenas ĉi tiu valora ero.

Kio estas al la viroj? De kio ili suferas? Ĉu ili neniam renkontis virinojn kiuj forgesas la amantojn tuj kiam ili foriras, kiuj ne havas takton, kiuj ne multe ŝatas infanojn aŭ florojn, kiuj vere interesiĝas pri ideoj ĉiaspecaj, kaj kiuj rifuzas konsideri la trompadon al la viroj kiel necesa parto de ina ekipo?

Estus interese scii ĉu ĉi tiuj elparoladoj pri virinoj estas tute sinceraj, aŭ ĉu ili devenas de ia subtila memflatado ke la viroj forte penas subteni kelkajn lastajn komfortigan iluziojn lasitajn al ili el ŝanĝiĝanta kaj renversata mondo.—NIRINO.

# RECENZOJ

**La Hontemulo; La Unua Kiso.** De Herman Bang, trad. Leono Vienano. Eld. N. Szapiro, Varsovio, Nowolipki 8, Pollando.

32-paĝa skizo pri la mallonga vivo de bela junulo, kiu venas al malbona fino. Konsumata de troa sekspsika stato, li forlasas lerni solidan metion, prefere ŝatante kiel kelnero la anime malsanecan kunestadon de parfumitaj virinoj, kaj sin mortigas post freneza vizito al bordelo. Leginte ĉi tiun ni rememoras pri la trafaj diroj de Keyserling, Tagore kaj Gandhi, inter aliaj, kiuj asertas ke Eŭropon obsedas seksinkubo koruptanta en forta grado ĝian spiriton kaj intelekton. Ekspluatante la komunan malsanon, la komerca reklamo, la teatro, kaj la literaturo haladzas la deziratan fetoron.

La lingvo de ĉi tiu serio estas daŭre altnivela. "Senedziĝa infano" (eksteredzeca . . . ); "Jazono" (A. Jason, Greka Iasoon: ĉu ne pli bone Jasono?).

**Pola Folkloro kaj Popolkanto,** originale verkita de S. Grenkamp. Eld. Esperantista Voco, Jaslo, Pollando. Paĝoj 60, prezo 1.60 sv. f.

Malgranda verko, sed evidente bazita sur profunda. simpatia legado kaj intima kono de la pola popolo. Lerte li analizas per malmultaj bone elektitaj vortoj la ennaskajn karakterajojn de la diversaj regionaj tipoj kaj esploras la fontojn el kiuj ŝprucas la kantemo kaj amo al la tradicioj, kio igas tiele interesa kaj kolorvaria ilian festan kaj ceremonian vivon. Impona listo de 38 verkoj el 5 lingvoj atestas la paciencan studstreĉon de la kompilinto-aŭtoro.

S-ro Z. Zaleski, eminenta kritikisto kaj literato, lekciisto ĉe la pariza kaj varsovia universitatoj, skribis jene en antauparolo:

"Dank'al la invento de d-ro Zamenhof, la esperantistoj dissemitaj en la tuta mondo posedas nun praktikan interkomprenilon, faciluzeblan instrumenton, por transdoni sciencon, pensojn, eĉ valorojn precize literaturajn."

Tre meritplena laboraĵeto. Notoj: "monotonio" (unutoneco); "sublima" (superbela); "kompostas legendojn" (komponas . . .).—ROBO.

## COBURG ESPERANTO CLUB.

Nove elektita komitato aranĝas programon por festvespero okazonta en sept-o, ĉe kiu ni celebros la unuan datrevenon de nia klubo. Inter diversaj amuzaĵoj troviĝos ankaŭ teatraĵeto, por kiu la roluloj nun faras diligente la antaŭprovojn. Invitojn ni sendos al reprezentaj anoj de la ceteraj kluboj.

Celante pliampleksigi je plejeble modera elspezo nian novefonditan bibliotekon, ni decidis anonci deziron doni librojn kaj gazetojn kontraŭ Esperantaj verkoj. La bibliotekisto danke ricevis du binditajn librojn de S-ro E. Hearne, klubano.

## LINGVAJ DEMANDOJ.

**Pri la sufikso -in.** Troveblaj en nia literaturo estas formoj kiaj "virgino, belino, teoriino, revoluciino" (la lastaj du en "Sennacieca Revuo" 10.3.33) anstataŭ la formoj "virgulino" k.c. Lau nia ĝisnuna kono la sufikso -in povas esti metata nur ce substantivaj radikoj sekshavaj (porko; pork-in-o, insekto, insekt-ino) kaj tute ne ĉe radikoj adjektivaj kaj neŭtro-substantivaj.

Lau la Universala Vortaro ni komprenas ke vortoj kiaj "belino, revoluciino" devas signifi virinsekhava belo, revolucio havanta virinan sekson! Komprenebla absurdo. Plue, se iu defendanta tian formadon respondus ke "belino" signifas "bela ino" ni rebatus. Ĉu do li kuraĝus skribi "fortino," "soifino," "parolemino" anstataŭ "forta ino" k.c.? Kaj se vere "virgino, belino, junino" estas virinseksaj animoj, ĉu "virgo, belo, juno" estas uzeblaj por nomi la virseksajn?

Kelkaj vidas en ĉi tiu strangaĵo ankoraŭan minacon al nia unueco de vortkonstruado. Tiuj favorantaj ĝin ja povas citi el Grabowski. Sed la fakto ke tiu majstro-stilisto prove tiel kunmetis neniel signifas, ke ni sendemande akceptu kiel bonan ĉiun apartan formon de li enkondukitan.

Al H. K. Pri la formoj **antaŭ ol** kaj **antaŭ kiam.**—La unuan formon oni trovas ĉe la plej multaj aŭtoroj, sed kelkaj, opiniante ke tia ideo enhavas per si mem aferon de tempo pli ol komparon, anstataŭigas nun ol per **kiam,** kiu estas logike tute bona. Oni memoru, ke en Esperanto la ĝisnuna neuziteco de tia aŭ alia formo ne signifas, ke tia formo estas neuzebla, se ĝi estas per si mem logika kaj konforma al la spirito de nia lingvo. Antaŭ kiam estas en tiu kazo. Kabe uzas ĝin en "La Faraono."

Al en Y. **Formato 14 x 20cm.** Ĝis nun neniu vortaro nek lernlibro montras kiel legi "x." Oni povas legi "per," ĉar ĝi estas signo de obligo.

C. en P. **"Pins and Needles."** Tre dube ke laŭvorta traduko estus komprenebla. La angla signifo estas: the pricking, tingling sensation attending the recovery of feeling in a limb which has "gone to sleep"; formication. La francoj diras; la main me fourmille; avoir des fourmis dans les jambes. Kial ne diri: Formikoj marŝas (promenas) en miaj piedoj?

Bo. en H. **Tribuno.** Estas domaĝe ke iuj uzas la vorton en senco de "estrado," "podio," pro tio ke verkante pri la historio de antikva Romo oni devas uzi ĝin por traduki la latinan "tribunus" (tribune) kiel en "tribunus plebis" (A. tribune of the plebs). La latina "tribunal" signifas "raised platform." En la angla "tribune" havas ambaŭ signifojn.

Ta. in G. **Ĉiuj la.** Kelkaj profunde studintaj la lingvon, inter ili s-roj Bailev. Butler and Gordon, aŭ plene aprobas aŭ rigardas kiel diskutindan la uzon de "la" post "ĉiuj" kiam "ĉiuj" signifas la tuton de menciitoj. Tamen ni ne konas lernlibron, kiu tiel konfirmas.

Ge. en Ro. **Afero.** Privat en "Karlo" skribis: Li eniris butikon por aĉeti aferojn. Tia uzo estas nun malofta, sed en la fruaj tagoj oni ofte ĝin vidis. Vidu Boirac' an Vortaron. En la Deutsch - Esperanto Worterbuch de Pfeffer ni legas: Ding—aĵo, objekto, kozo. La lasta estas F. chose, I. H. cosa.

K. en ti. **"Pri" kiel prefikso.** Ne estas kutime prefiksi "pri" en vorto esprimanta **aplikon de substanco.** Oni diras "olei' buteri, ciri, koti, korki, ori, gudri" ktp. Oni ja diras "prisemi la kampon," ĉar oni semas semon. Oni diras "orumi" nenecese. "Oritaj" (Rabeno de Baharah).

Ni kore petas kunlaboron de ĉiuj por tiu kolumno. Demandojn kaj respondojn kaj komentojn pri respondoj ni volonte presigus. Ni celas per kiel eble plej multpersona diskutado ataki kaj venki tiujn prilingvajn problemojn, diversgrade gravajn, kiuj jen kaj jen dancas antaŭ la cerbojn de Esperantaj literaturemuloj.

## VIZITO AL LA "KOELN."

En la tago kiam la germana krozoŝipo Koeln elĵetis ankron en Sidnejan Havenon diris mia amiko: "La Koeln alvenas hodiaŭ kaj la venontan sabaton ĝi malfermiĝos por publika inspekto. Ĉu ni iru ĝin vidi?" Avide mi konsentis.

Venis sabato, malhela, iom pluvema. Ni atingis la 4an Enŝipiĝejon, ĉe la Rondkajo, je dek minutoj post la dekkvara kaj tuj aliĝis al atendlinio jam tre longa. Tie ni restis tutan horon, puŝante, puŝigante, sanceliĝante, reakirante la ekvilibron kaj ŝajne farante ĉion krom antaŭen-iri. Fine tamen ni trovis nin transe de la pordego, kun junulino febre tenanta mian dekstran brakon, kaj tute perdinte mian amikon. Liberiginte min el la obstina virina mano, mi retrovis la kamaradon, kaj ni nin direktis al la pasponteto. Sed tie ĉi estis homamaso preskaŭ tiel demsa, kiel tiu, kiun ni ĵus postlasis. Apenaŭ evitinte trapikon de l'balustro, mi sukcesis atingi la ferdekon de la ŝipo, kaj tie atendis ĝis alflankiĝis mia kunulo, kiu, penegante liberigi la palton for de tiu pikilhava balustro, jam dek minutojn baris la ponteton, ĉirkaŭate de la blasfemoj de la kolera amaso. Kun sento de granda senŝarĝiĝo ni foriris laŭ mallarĝa koridoro kaj komencis esplori la Koeln.

Tuj nin impresis la manko de spaco pro la granda kvanto de maŝinaro kaj aparato—kaj la amemo de la ŝipanoj al la lokaj knabinoj belaj, nebelaj kaj malbelaj. Ni vidis neniun forpuŝiajn admirantinojn, sed nia decosento ofendiĝis, kiam tri blondaj granduloj senhonte ĉirkaŭprenis tri junajn virinojn dum alia blondulo ilin fotografis. Ni forrapidis!

Tiam ni babilis angle kaj germane kun suboficiro, post kio ni trovis du ŝipanojn, kiuj skribis siajn nomojn per gotaj literoj (je mia speciala peto) en mian poŝlibron. Tie ĉi ni ja devis paroli tute germane, ĉar ili ambaŭ sciis nek Esperanton nek la anglan. Deirinte de ili, ni vagis tien-reen sur la supra ferdeko, esplorante la pafilegojn, boatojn, kompason kaj ĉian troveblan interesaĵon. Ofte ni haltis por paroli kun membroj de la ŝipanaro, kiuj ĉiam estis ĝentilaj kaj komplezemaj.

Sed subite ni ekkonsciis, ke subiras la suno, eknoktiĝas. Ni malsupreniris kaj trovis junan kadeton deĵorantan, kiu iom sciis la anglan. Li plaĉis al ni pli ol iu ajn alia sur la sipo. Longan tempon ni diskutis kun li interesaĵojn—"nian Pontegon," Sidnejon, kaj Aŭstralion ĝenerale. La lumoj de la urbo jam trembrilis trans la Haveno, kiam ni fine adiaŭis nian novan amikon kaj eliris el la krozoŝipo. Penseme ni rapidis al la pramstacio; mia kamarado rompis la silenton:—"Ĉiam mi memoros tiujn germanojn; ili estas boneguloj."

(A. TOWSEY)

## PRI "PSEŬDOSUFIKSOJ."

Interesa kaj ankoraŭ aktuala estas la jena artikolo de Bernard Long, en "Literaturo" por okt-dec., 1922. Almenaŭ kelkaj el tiuj lautvoĉe kriantaj favore al senindulga forigo de tiuj "pseŭdosufiksoj" tre supozinde ne sufiĉe studis tion, ke ĉe la Majstroverkoj ofte troviĝas tiuj formoj ekz. "modifikacio, racionala, provincialismo, hermetike, uzurpatoro."

"Tendenco montriĝas en la nuna E. literaturo forlasi la uzadon de vortoj finiĝantaj per -oro, -acio k.t.p. kaj anstataŭigi ilin per formoj kunmetitaj el pli simplaj radikoj. Ekz., "inspektisto" por "inspektoro," "redaktisto" por "redaktoro," "redaktejo" aŭ "redaktistaro" por "redakcio" k.t.p. Oni uzas novajn formojn kiel "konversi" (por "konversacii"), "kondoli" (por "kondolenci") . . . Multaj el la (plilongaj) formoj jam de jaroj ekzistas en la lingvo, multaj nun estas "oficialaj," kaj multaj estas plene Zamenhofaj. Tiaj vortoj ofte taŭgas por specialaj sencoj, kaj ankaŭ ili ne ĉiam havas eĉ la saman signifon kiel la kunmetitaj formoj. Ekz., "bankiero" havas pli difinitan sencon ol "bank-isto"; "rezignacio" tute ne signifas la samon kiel "rezigno," nek "formacio" kiel "form-ado," nek "konduktoro" kiel "konduk-isto" (kaj tie ĉi la radiko estas malsama, nome, kondukt (or) kaj ne konduk) . . . "Prokuroro" estas speciala persono, tute alia ol "prokur-isto." "Konfirmacio" kaj "Reformacio" taŭgas por siaj specialaj signifoj, kaj povas tre bone resti kune kun "konfirmo" kaj "reformo."

Li fermas per konsilo esti zorga pri tiaj vortoj, kaj ne elgladi pitoreskecon kaj utilan nuancriĉecon el la lingvo.

Kinulo (filmadisto) el Sovetio, 21-jaraĝa, serĉas korespondantojn el Aŭstralio, Nov-Zelando, Tasmanio kaj aliaj insuloj. Li nepre respondos al ĉiuj per il. p.k. Skribu esperante aŭ ruse. K-do Kozlov, A.A., Vorenej c.-co., ul St. Razina 41, kv. 8, U.S.S.R.

"Coburg Esperanto Group" deziras aĉeti librojn bonstatajn por fondi bibliotekon. Sciigu al sek-io: G. W. Burns, 21 High-st., Coburg, N13., Vic.

**For 4/- a Year.**

For 4/- a year we offer to supply copy of La S.K. to any foreign correspondent or local institution at request of any of our subscribers.

We would also remind those who are behind in their "abono" that their delay represents a deadweight drag on the wheel of progress. Our task of bringing out the double-size "Suda" calls for the loyal collaboration of all. We ask those concerned to think what our organ means to the movement, and then write out that postal order.

## KVAKERISMO KAJ PACO.

**Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samaria, PAPUA. (fratorganoj bv. represu.)**

## DE ANATOLE FRANCE.

**En 1907.**

Industria perforto naskigas militan perforton . . . . Komerca konkurenco ekbruligas internacian malamon, kiu finiĝas nur kun sango. Kiel la feŭda ŝtato, tiel ankaŭ la kapitalista ŝtato, volviĝas en milito. Sub la ekzistanta reĝimo la naciista produktado estas la pafilegoj, kiuj starigas doganmurojn, malfermas komercvojojn. Milito de eksterminado neeviteble sekvos el la ekonomiaj kondiĉoj, kiuj direktas la civilizitan mondon.

**Justeco kaj La Homoj.**

La homoj ne sufiĉe perfektiĝas ekzerci justecon en la nomo de virto; la leĝo de la vivo devas esti indulgo kaj bonkoreco.

**La Vera Dio.**

Ĉe Theophile Gautier unu tagon, Baudelaire vidis sian amikon Charles Asselineau kun malbelega idoleto skulptita de Konga nigrulo el la trunketo de figarbo. Ĝi estis la figureto de viro kun kapo dufoje tiel granda, kiel la korpo, kaj kun buŝo de orelo al orelo.

"Kiel terure la objekto aspektas," ekdiris Asselineau, formetante ĝin malaprobe.

"Zorgu," avertis Baudelaire, "Supozu ke ĝi estus la vera dio."—Tradukis Leti.

### Knabeto kaj Knabineto.

En granda urbo, kie estis tiomege da personoj kaj domoj ke ne sufiĉis spaco por ke ĉiu havu eĉ etan gardenon, kaj kie ili plejparte devis kontentiĝi per floroj en florpotoj, loĝis du malriĉaj infanoj kiuj havis ĝardenon iom pli grandan ol florpoto. Ili ne estis gefratoj, sed tiel amis unu la alian kvazaŭ ili estus tiaj. Iliaj gepatroj loĝis precize kontraŭe en du mansardoj, ĉar kie la tegmento de la unu domo estus kunliganta la alian, se ilin ne apartigus la kanaleto kuŝanta inter la du, tie estis en ĉiu domo fenestreto, kaj oni nur devis tranpaŝi la kanaleton por atingi de unu ĝis la alia.

Ekster ĉiu fenestro estis granda ligna kesto, en kiu kreskis kelkaj kuirherboj kaj rozarbeto, florantaj egale bone en la du. Venis en la kapon de la gepatroj la ideo meti la kestojn transflanke super la kanaleto, tiel ke ili atingis preskaŭ de unu fenestro al la alia, aspektante simile al du muroj kvazaŭ kronitaj per floroj. Pizoj malsupren pendis sur la flankoj de la kestoj, kaj la brancoj de la rozarbetoj antaŭen sin klinis unu al la alia, tiamaniere ke ili aspektis preskaŭ kiel triumfarko el folioj kaj floroj. Ĉar la kestoj estis tre altaj kaj la infanoj ne permesitaj surgrimpi sur ili, ili ofte ricevis permeson eliri el la fenestroj, kie, sidiĝinte sur siaj taburetoj, ili kune ludadis.

(daŭrigota.)

### A Little Boy and a Little Girl.

In a large city, where there were so many people that there was not room enough for all to have even a little garden, and where they were mostly, therefore, obliged to be satisfied with flowers in flowerpots, there lived two poor children who had a garden a little larger than a flowerpot. They were not brother and sister, but were as fond of each other as if they had been so. Their parents lived exactly opposite in two attics, for where the roof of one house would have joined the other, only that they were separated by the gutter running between the two, there was in each a small window, and one had but to take a step across the gutter to reach from the one to the other.

Outside each window was a large wooden box, in which grew some kitchen-herbs and a rose-tree, flourishing equally well in the two. It occurred to the parents to place the boxes crossways over the gutter, so that they reached nearly from one window to the other, looking like two walls surmounted by flowers. Peas hung down over the sides of the boxes, and the branches of the rose-trees bent forwards towards each other, so that it looked almost like a triumphal arch of leaves and flowers. As the boxes were very high, and the children not allowed to climb upon them, they often received permission to get out of the windows, where, seated on their little stools under the rose-trees, they used to play together.

(To be continued.)

---

**Melbourne Esperanto Club.**—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

**Westralian Esperanto Society,** Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikaĵojn al la sekretario.

**Masterton (N.Z.) Esperanto Club.**—Meets Tuesdays at 8 p.m. in Y.M.C.A. Patrons: The Y.M.C.A. board of directors; Hon. Pres., G. R. Sykes, Esq., M.P.; Pres., Mr. A. Dewar, D.B.E.A.; Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A. Address: 38 Worksop-rd., Masterton. Visitors welcome.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro C. Brandon. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesd-y, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. V. Leck; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretariino, f-ino L. Irwin, D.B.E.A.. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18½h.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbana Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str:, proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

**Coburg Esperanto-Grupo**—Kunvenas ĉiuĵaŭde je la 8a vespere ĉe la Labour Hall, Sheffield-st., Coburg (malantaŭ Grand Teatro). Prezidanto, s-ro E. Williams; sek., A. W. Spencer, 48 Munro-st., Coburg. Vizitantoj ĉiam bonvenigataj.

**Latest Date for "Copy"—Sept. 20.**
**NEXT NUMBER—Sept. 28.**

### En 1905.

Dum jarcentoj milito estas neforigebla kondiĉo de nacia ekzistado.—Nova ordo de aferoj, novaj sciencoj, eltrovoj, novaj ekonomiaj postuloj, altrudos pacan staton al la homoj, ĝuste samkiel ĝis nun la kondiĉoj mem de ilia ekzistado lokigis ilin kaj starigis ilin en stato de milito. Ne ni, eĉ la plej juna el ni, vidos la finon de la epoko de armiloj.

---

**Per la Kristfratineto jen jam surtere La Preternacio Konstancia. Kia estas Konstancio? Kore klarigos Eliot, 2 Cambridge St., Willoughby, N.S.W.**

---

**La Preternacio Konstancia. Leĝo rilate la enmigradon. Eliot, 2 Cambridge St:, Willoughby, N.S.W.**

---

### TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following:—

Mr. J. B. Galloway, 4/6, March, '34; Mr. G. Gordon, 5/-, June, '34; Mrs. Trewin, 4/6, Aug., '34; Mr. Ravelich, 5/-, May, '34; Mr. A. Hodges, 5/-, June, '34; Melbourne Esperanto Club (subs.), £1/10/-, (sales) 5/3; Mr. Flanagan, 4/6, Sept., '34; Mr. Kidd, 9/6, Oct., '35. Mr. A. J. Davis, 4/6, July, '34; Mr. Hudson, 4/6, July, '34; Mr. H. N. Love, 4/6, June, '34; Miss Bostock, 2/-, Dec., '33; Mr. J. Eliot, ad., 2/-; Coburg Club ad., 1/-; Miss Abbot, 5/-, July, '33.—12/8/33.

Wholly set up and printed in Australia by the Triumph Press, Surrey Hills, Victoria.